Albert Theodor Gellerstedt,

I Bacharach

Vi tecknat oss trötta och matta
i sol'n i Sankt Werners ruin,
och slut med att skämta och skratta
vi trängde till mat och vin.

I staden där nere vi funno
likt ombonadt fågelbo
ett värdshus i blompyntad trädgård
med gammaldags snitt och ro.

Där dukades flinkt under löfhvalf,
dit solgasset ej sig stal;
snart ångade mustiga steken,
och bägarn kom full och sval.

Tillbaka vi kunde oss tänka
åtminstone hundra år,
ty allt var så rundligt och billigt,
man såg af »Geschäft» ej spår.

Vi tände vår pipa, och stämda
som ynglingar bägge två,
vi blåste mot taket af vinlöf
i kapp våra rökmoln blå.

...

Albert Theodor Gellerstedt,

En Baĥaraĥ'

tradukita de N. N. 53

Desegnante multhore ni sidis
en sunbril' en monta ruin'.
Jam ne ŝercis ni, aŭ ridis,
sed sopiris al manĝ' kaj vin'.

En la urb' en la valo ni trovis,
kiel neston de birdogent',
gastejon en florĝardeno
kun malnova stil' kaj silent'.

Nia tablo staris en ombro
en ŝirm' je suna varmaj';
da glasoj jen plena nombro,
kaj bonodoranta rostaĵ'.

Malnovtempon ni vidis revante,
ĉar ne estis moderna la ŝajn' -
malaltpreze ja ĉio, kaj grandkvante,
sed ne konsideroj pri gajn'.

Ekbruligis la pipojn ni feliĉaj,
kaj leviĝis la fum' al plafon'
konsistanta el branĉoj foliriĉaj
en volbeforma malpeza kron'.

...

Och härligen stärkta och glada,
som icke på länge förr,
först sent och för alltid vi gingo,
vår väg ut ur gästfri dörr,

där värdfolkets halfvuxna dotter
stod nigande, blomstrande röd,
och åt oss i rikliga lotter
förtjusande rosor bjöd.

Verkinto de tiu ĉi Sveda poemo estas Albert Theodor Gellerstedt *(∗1836-10-06 – †1914-04-07).*

MR-480-0 / Arg-816-1636 (2013-02-04 10:43:09)

Origina sveda-lingva teksto, verkita de la poeto Albert Theodor Gellerstedt (06.10.1836 – 07.04.1914), trovita en la retejo `http://runeberg.org/eftersom/11.html`. *Pri la poeto vidu la vikipedian retejon* `http://sv.wikipedia.org/wiki/Albert_Theodor_Gellerstedt`.

Sentante viglecon kaj ĝojon
pli ol estis kutime al ni,
nur malfrue ni iris la vojon
por ĉiam for el dom' tiu ĉi.

La gemastra filin' ĉe la pordo,
kun bela ruĝec' sur vizaĝ',
donis rozojn en ĉarma ordo,
kaj bondezirojn por nia vojaĝ'.

Traduko de la Sveda poemo "I Bacharach" de Albert Theodor Gellerstedt *(∗1836-10-06 – †1914-04-07) en Esperanton de N. N. 53.*

MR-480-0 / Arg-816-1637 (2013-02-04 10:42:54)

Esperantigo verkita de nekonatulo. Vidu ankaŭ: `http://www.literaturo.dk/baharah.htm`.